

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 297 (64) - KVINA EPOKO

DECEMBRO 1996



ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/  
Katalunio

Tel. (93) 716.36.33, (93) 710.96.36 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a  
kaj 20h.). Kolektiva membro de Literatura Foiro

**Kotizoj por la jaro 1996:** Individua Abonanta Membro 3.350 p-toj;  
Individua Subtenanta Membro 6.700 p-toj; Individua Dumviva Membro  
67.000 p-toj; Kolektiva Membro 6.700 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

**Banko:** Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - agència 461 Sabadell.  
Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

**Plenumkomitato de KEA:** Prezidanto: Josep Franquesa; Vicprezidanto:  
Lluís Armadans; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; Vicsekretario: Hektor  
Alos; Kasisto: Llibert Puig; Komitatanoj: Miguel Ángel Altuna, Felip  
Artero, Paco Belmonte, Bartomeu Costa, Ĝirona Espero, Francesc Ibáñez,  
Joan Marimon.

**Kontrolo Komisiono:** J.R. Guiñon, X. Margais, Ll. Pi

**Kataluna Esperantisto:** M.A. Altuna, C. Berga, P. Bernús, Ll. Puig, O. Puig,  
X. Rodon, Luz Vázquez

**Kataluna Esperanto-Junularo:** Apartat 32.318 - 08080 BARCELONA

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la  
starpunkton de KEA, se ili en estas subskribitaj ĝianome.

**Impres a/Presita ĉe:** Ràpid Graf. Sabadell. Tel. (93) 725.50.91

**Dipòsit Legal:** B-27362 - 1982

### CES en Interreto (Internet)

Centro de Esperanto Sabadell afiŝis paĝon en la disfamiĝinta komputil-reto Internet (adreso: <http://www.inter-red.com/esperanto>), en kiu ĝi nuntempe anoncas ĉefe siajn esperanto-kursojn. Grupeto de KEA-retanoj pretigas priesperantan "paĝaron" (informojn rete atingeblajn tra la t.n. Tut-Tera Teksaĵo - angle "Word Wide Web"). Jam centoj da esperantistoj estas ligitaj per interreto, i.a. almenaŭ dek katalunoj. El la diversaj landaj asocioj kiuj pretigis sian paĝaron, elstaregas Flandra Esperanto-Ligo ([www.knooppunt.be/~fel](http://www.knooppunt.be/~fel)) dank'al ĉiaspecaj informoj, senpaga aliro al multaj artikoloj de la revuo *Monato*, detala indekso kaj nenombreblaj ligoj al aliaj esperanto-paĝoj.

**K**ataluna Esperantisto havas novan redaktoran teamon kiel vi povas legi en la ĉi-apuda kolofono. Ni adiaŭu kaj danku la eksan teamon pro la plenumita altkvalita laboro, kiun malfacile supereblas. La novuloj tamen kun freŝa entuziasmo celas plej bone labori kaj laŭ antaŭvidita plano reguligi la aperon de nia revuo je ofteco trimonata.

En la nuna numero elstaras sendiskute la vasta agado de nia asocio kaj ankaŭ de siaj membroj internacinivele: vidu raportojn de nia prezidanto kaj ties filo aktive partoprenantaj la Italan Kongreson kaj de barcelona paro Neus Moly kaj Ramon Parera gvidantaj E-kurson en la Kataluna Somera Universitato en Prada.

Ankaŭ ĉi-jare KEA reprezentigis en la UK en Prago, en la Kongreso de la Federacio de Langvedoko-Rusiljono kaj en St. Fèlix de Riutort ĉe inaŭguro de E-strato.

Malvasta, sed tamen informbunta fariĝas ĉi-numero kun la sciigoj pri la uzo de Esperanto en oficiala ekzameno pri la angla lingvo por aliri en la universitaton kaj la aperigo de tutpaĝa pagita anonco de nia kataluna registaro en la junia numero de la revuo de UEA.

La legantoj cetere informiĝos pri la evoluo de la projekto de kunlaboro kun Bosnio kaj pri la preparlaboroj de nia nunjara Kongreso okazonta en Figueres, kies aliĝilon ni kunsendas.

Fine ni alvokas la kunlaboron de niaj membroj en ĉiu iniciatoj de nia Asocio kaj petas ke vi informu nin pri eventualaj ŝanĝoj de via adreso kaj bankkonto, kio ege faciligos nian organizon.

Bonan legadon kaj ĝis venonta revuo en marto 1997.

# BOSNIO KAJ NI

Nia projekto de kunlaboro kun Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBiH) por la restarigo de la tiea E-movado, disvolviĝas preskaŭ laŭ antaŭvidita ritmo, kaj ni ĝojas informi niajn membrojn pri tio.

Se vi bezonas rememorigi la enhavon de la projekto, ni invitas vin relegi la tre ampleksan informon sur nia antaŭa revuo de majo 96 en p. 10-11-12.

La projekto konsistas el 4 eroj kiel informite kaj ni sukcese plenumis tiun de la venigo kaj gastigado ĉe ni de 15 bosnaj infanoj, kiuj kun sia gvidantino Azra Ĉoliè, edzino de la prezidanto de ELBiH, restis ĉe ni 3 semajnoj, inter la 7a kaj la 28a de julio.

La gastigadon de la infanoj prizorgis Centro de Esperanto Sabadell (CES) kaj en tiu urbo gastis la plejparto de ili, cetere 3 gastis en

Polinyà kaj po 1 en Barberà kaj St. Quirze del Vallès.

Je alvoko de CES tra la lokaj ĵurnaloj, sin proponis pluraj familioj, inter ili kelkaj esperantistaj, pretaj gastigi infanojn, kiuj kunvenis plurfoje kaj inter ili formiĝis organiza komisiono laŭcele pretigi taŭgan agadprogramon. Oni celis ne laborigi la infanojn sed distri ilin kaj tiel oni pretigis interesan programon (legu ĝin aparte).

CES proponis rapidan dumonatan E-kurson al la gastigantaj familioj laŭcele faciligi la interkomunikadon kun la bosnaj infanoj kiuj ankaŭ lernis Esperanton en Sarajevo. Tamen ĉar ne ĉiuj familioj partoprenis, la rezulto ne estis centprocente efektiva, sed tiuj kiuj lernis la lingvon eĉ dum mallonga tempo, ili sufiĉe interkompreniĝis laŭ la akirita nivelo.

La alveno de la bosna karavano estis antaŭvidita dimanĉon 7an de julio je la 21,30 h. vespere, sed pro sinsekvaj elirprokrastoj en Ljubljana, ili alvenis lunde je la 3a h. frumatene, tamen kaj la organizantoj kaj ĉiuj familioj pacience atendis en la flughaveno kun forta emocio kaj kun granda bonveniga 5-metrojn longa afiŝo kun jena teksto: BONVENAJ EN KATALUNIO kaj en Esperanto kaj en bosna lingvo.

La infanojn gvidis kaj prizorgis dum ilia restado, la bosna gvidantino Azra Ĉoliè kaj niaj katalunaj aktivuloj Pere Bernús kaj Arnau Torras.

Nia iniciato vekis grandan publikan intereson kiel pruvas la fakto ke la loka gazetaro kaj du katalunaj televidoj informis pri ĝi kaj cetere kiel konsekvenco CES altiris duoblan pli grandan lernantaron al siaj ĵus komencitaj kursoj.

## PROGRAMO DE LA SOMERFERIADO DE BOSNAJ INFANOJ EN KATALUNIO

■ Tuttagaj ekskursoj okazis ĉiusemajne: dum la unua ili vizitis en Barcelono la Barça-n stadionon kaj muzeon kaj la glaci-palacon dummatene kaj "Aquarium" posttagmeze; dum la dua ili vizitis Palamós-plaĝon dummatene kaj Girona-urbon posttagmeze kaj dum la tria ili vizitis *Port Aventura* (tiu lasta vizito sub la aŭspicio de la komerca entrepreno "Congelats la Sirena").

■ Tuttagan sportumadon ili praktikis en sporta pavilono de St. Quirze del Vallès.

■ Dufoje ĉiusemajne ili sin banis en sabadella municipa naĝejo tre konata, "La Bassa", dummatene

kaj posttagmeze ili ekzercis kanzonan repertuaron bosnan, katalunan kaj esperantan, kiujn ili prezentis en koncerto dum adiaŭa festo lastsemajna.

■ Kulturaj vizitoj okazis al la Paleontologia Muzeo kaj al la Astronomia Observatorio.

■ Oficialaj akceptoj okazis en la Urbodomoj de Sabadell, Sta. Perpètua de la Mogoda kaj Polinyà (vidu sur la frontpaĝo la sabadellan akcepton kun la tiea urbestro), kiuj cetere plejparte subvenciis la tutan 1.500.000-pesetan buĝeton de la programo.

■ Adiaŭa festo ĉe urbocentra placo sabadella okazis lastan ĵaŭdon

kaj tie niaj bosnaj kaj katalunaj infanoj kantadis kaj ankaŭ tion aparte faris la saharaj infanoj, samtempe gastigataj en la urbo.

■ Adiaŭa kaj danka vespermanĝo okazis lastan vendredon inter la infanoj kaj la gastigantaj familioj kun projekcio de videofilmo pri Sarajevo.

## ĈEMIZOJ PRI LA PROJEKTO

Sendube vi rimarkis sur la frontpaĝa bildo ke la infanoj surportas someran kotonan ĉemizon tre allogan kun surprisigo pri nia projekto. Temas pri plurkolora bildo de nia parto de la terglobo (ĉar nepre devis aperi ambaŭ landoj rilatantaj la projekton) kun la simbolo de la paco kaj la teksto ESPERANTO vertikale kaj de maldekstre-dekstren CATALUNYA A BOSNIA. Unu sola litero A kunligas la tutan tekston.

La artan ideon de la ĉemizo ni ŝuldas al nia sabadella desegnisto Arnau Torras, kiu malavare kontribuis al la projekto per sia artaĵo.

Ni mendis 300 ĉemizojn kaj preskaŭ ĉiuj vendiĝis je la modera prezo de 1.000 p-toj, kio ankaŭ kontribuas financi la projekton. Restas malgranda stoko je dispono de nia membraro en sola mezuro L, taŭga por aĝaj infanoj aŭ plenaĝuloj ne tro dikaj. Ni sendos poŝte menditajn ĉemizojn kun

aldono de 200 p-toj por afranko. Kun via mendo sendu samtempan poŝtĝiron de entute 1.200 p-toj nome de nia asocio al nia poŝta adreso: **Asociació Catalana d'Esperanto**

Apartat 290  
08200 SABADELL

Tamen se vi pagas per ĉeko aldonu pliajn 150 p-tojn por bankelspezoj kaj la ĉeko fariĝu 1.350-peseta. Ankaŭ per tio vi helpas financi nian projekton kaj ĝi multe prestiĝigas nian aferon.

## KORESPONDADO

ZILINSKÍSNI, ONUTÉ

Ŝi deziras korespondi por kultura intersanĝo. Sia hobiaro: turismo, arto, teatro, psikologio kaj aliaĵoj. Ankaŭ gastigemas.

Ŝia adreso: Zilinkísni, Onuté

Jukneviciaus, 50-39  
4520 Marijampole  
LIETUVA-LITHUANIA



AMOROTTI, MARIA kaj BETTINO

50-jaruloj interesigantaj pri eŭropa kulturo kaj edukado, lingvaj minoritatoj, sociologio, historio kaj ĵurnalismo. Eblas reciproka gastado somere.

Ilia adreso: Amorotti, Maria kaj Bettino

Via Sordo, 6  
I-38100 Trento  
ITALIO



SAZONENKO, IGOR

Li deziras korespondon kun junaj katalunaj esperantistoj. Ŝatokupiĝas pri fabloj.

Lia adreso: Sazonenko, Igor

Kesto-62 210015 Vitebsk  
BELARUSJO (EŬROPO)  
Fax: 8-375 2122 54321



SÉRIE 3

83 — ANGLÈS

A LANGUAGE FOR ALL

Almost 3.000 Esperantists from around the *mondo* gathered in Finland for their annual *kongreso* and called on political leaders to take their *linguo* more seriously. Many of them think International organizations have a huge communications problem and believe Esperanto could really be a solution. In the conference centre, one of the attendants said: «There are 11 official languages in the European Union only and that creates lots of problems and expenses. Esperanto has so many advantages. There are only 16 grammar rules and it's really creative - you can say almost anything you want. But they don't want to listen».

Esperanto, invented in 1887 by the Polish philologist Ludwig Zamenhof, has survived worse threats than bureaucratic indifference. Hitler declared it a communist conspiracy, while Stalin thought it was a bourgeois idea and sent 11.000 Soviet Esperantists to Siberia. It is now thought to be spoken by 1-3 million people world-wide, from *Austria* to *Zairio*. This year's conference, the 80th, drew enthusiasts from 68 countries.

With the European Union estimated to be translating 3.150.000 words a day, at an average cost of 23p a word, Esperantists feel their language merits more official recognition. «It's easy to learn, and it's neutral so no one country feels superior», said Angelos Tsirimikos, a Greek interpreter for the European Union. «Where I work we get memos telling us not to waste toilet paper in 11 different languages. That can't be right.»

1. Answer the following questions without copying from the text. Use a minimum of 25 words.

- Which positive aspects about Esperanto are mentioned in the text?
- What are, according to the text, the problems concerning communication in the European Union?
- What are some of the difficulties Esperanto has faced since its invention?

2. Answer one of the two options using a minimum of 65 words:

OPTION A: You have been invited to speak at the Esperanto annual conference but you believe that English, not Esperanto, is the solution to world communication. Write down your speech.

OPTION B: Ludwig Zamenhoff called the language he invented «Esperanto» because the latin word «esperare» means «hope». He hoped his invention would create more understanding between the nations of the world. Before dying he wrote a message addressed «To the Young People of the World». Imagine what it said and write it down.

Marking criteria: Comprehension, 4 points; Fluency, 3 points; Accuracy, 3 points.

Districte universitari de Catalunya

Generalitat de Catalunya  
Consell Interuniversitari de Catalunya  
Coordinació del COU i de les PAAU



## ESPERANTO POR ALIRI KATALUNAN UNIVERSITATON

Esperanto fariĝis temo en ekzameno pri angla lingvo de komuna oficiala ekzamenaro por studentoj kiuj sin preparis por ekuniversitati. (Jen reprodukto de la tutpaĝa temo).

## KATALUNOJ EN LA ITALA KONGRESO

En la itala urbo de Ferrara okazis la 65a Itala Kongreso de Esperanto inter la 24a kaj 30a de aŭgusto 1996 kaj kiel kongrestemon oni pritraktis "La internacia komunikado en la malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj".

Partoprenis ĝin preskaŭ 200 geesperantistoj plejparte italaj memkompreneble, sed elstaris granda eksterlanda partopreno: katalunoj, germanoj, belgoj, francoj, svisoj, bosnoj, kroatoj, slovenoj, ĉeĥoj, poloj kaj ankaŭ unu pakistanano. Vere internacia etoso.

En la loka komercambro okazis 12 prelegoj pri la temo, inter ili tiuj de nia prezidanto Josep Franquesa pri "Esperanto, utila lingvo en komercaj rilatoj" kaj de lia filo Josep pri "Kompara analizo pri la ekonomia evoluo inter la malgrandaj italaj kaj alilandaj entreprenoj" kiun li elparolis rekte en la itala pro la fakto ke li loĝis de antaŭ pli ol unu jaro en Italio. Oni jam invitis lin prelegi denove en la venontjara itala kongreso okazonta en Napolo.




Nia prezidanto Josep Franquesa dum sia interveno



Josep Franquesa filo dum sia interveno

Nia prezidanto konkludas ke la malgrandaj entreprenoj kiuj volas diskonigi siajn varojn eksterlande kaj ne havas sufiĉajn rimedojn por pagi tradukistojn kaj interpretistojn al diversaj lingvoj, Esperanto povus esti la solvo. Ni komercistoj-esperantistoj membroj de IKEF (Internacia Komerca Esperanta Fakgrupo) jam faras tion.

### EŬROPA ESPERANTA - KULTURA SEMAJNO 1997 EN AALEN/STUTTGART



Sabate, 10/05/1997 - marde, 13/05/1997  
Esperanta Kultura Festivalo en Aalen

Vendrede 16/05/1997 - lunde 19/05/1997  
Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart

Marde, 13/05/1997 - vendrede, 16/05/1997  
Eŭropa Junulara Parlamento en Stuttgart

## EN LA NAJBARA KONGRESO

Ankaŭ ĉi-jare nia Asocio reprezentiĝis en la kongreso de la Federacio Langvedoko-Rusiljono okazinta en Chamborigaud la 4an de majo, kun interveno de nia estrarano Llibert Puig, kiu parolis pri la valoro de la solidareco kaj instigis la esperantistojn okupiĝi pri ĝi.

## NEKROLOGOJ

Francisca Roset i Marimon, patrino de nia samideana amiko Joan Ramon Guiñot Roset, forpasis la 18an de januaro 83-jara. Ni sincere kondolencas nian amikon kaj ceterajn familianojn.

Josep Climent i Grañana, nia veterana kaj fidela membro forpasis la 5an de aŭgusto 74-jara. Kortuŝitaj pro tiu amika perdo ni kondolencas la familianojn.

## NASKIĜO

Ni donas la plej elkoran bonvenon al la unua filo de nia kara amiko kaj nuntempa ĝenerala sekretario de KEA, Xavier Rodon kaj de lia kunulino Gemma Armadans. Joel Rodon i Armadans naskiĝis la 13/3/96.

## KATALUNOJ EN PRAGO

Deko da katalunaj geesperantistoj aliĝis al la aviadila kolektiva vojaĝo kiun KEA organizis por ĉeesti la 81an Universalan Kongreson okazinta en Prago inter la 21a kaj 28a de julio ĉi-jara. Jen parto de ili sur la foto, ĉu en laborkunsido?

## LERNOJARO 96/97

Kutime la kursoj de E. komenciĝas ĉiujare en oktobro. Laŭ ĝisnunaj ricevitaj informoj ni scias ke en Sabadell komenciĝis 4 samtempaj kursoj kun entute 20 gelernantoj, jene distribuitaj: 2 elementaj kursoj kun 12 gelernantoj, 1 meza kurso kun 4 gelernantoj kaj 1 infana kurso kun 4 gelernantoj.

En Barcelono ĉe Unesko-Klubo komenciĝis elementa kurso kaj meza aŭ konversacia.

En St.Cugat kurso ne okazas ĉar enskribiĝis unu sola homo, laŭ informo de la tiea prezidantino.

Post kelkjara paŭzo, denove la malmultaj sed persistaj geesperantistoj en Sta. Coloma de Gramenet, komencis elementan kurson kun 8 lernantoj, kiu okazas ĉiŝaŭde vespere en la sidejo de la loka ekskursia societo "Puigcastellar". Ni deziras al ili la plej bonan sukceson.

Ni volonte aperigos informojn pri aliaj kursoj en venonta revuo.

## KATALUNA INSTITUCIA ANONCO

Dank' al la demarŝoj de nia Asocio, la kataluna registaro aperigis tutpaĝan pagitan anoncon en la junia revuo de UEA, kie anonciĝas ke la kataluna librotago kiun tradicie oni festas la 23an de aprilo, tago de Sankta Georgo, estis deklarita de Unesko, Monda Tago de la Libro kaj de la Aŭtorrajtoj laŭ propono de nia kataluna registaro. (Jen reduktita reprodukto de la anonco).



LA 23an DE APRILO ILI ESTAS KATALUNAJ

La 23an de Aprilo estas Monda Tago de la Libro kaj de la Aŭtorrajtoj, deklarita de Unesko. Ĝi estas tago de la kataluna librotago, kiu estas tago de la kataluna literaturo. Ĝi estas tago de la kataluna lingvo, kiu estas tago de la kataluna kulturo. Ĝi estas tago de la kataluna popolo, kiu estas tago de la kataluna identeco.



## INAŬGURO E-STRATO EN ST. FÈLIX DE RIUTORT

La pasintan 21an de Septembro oni inaŭguris e-straton en arieĵa vilaĝo St. Felix de Riutort, (proksime de Foix), kio estis preteksto por aranĝi tutan poresperantan tagon organizitan de Rondo de E-Studoj en Arieĵo kaj la urbodoma fest-komitato.

Ni ŝate akceptis la inviton de tiea aktivegulo Jorgos kontribui la programon per popolkanta koncerto. Sekve duaŭtomobila kataluna karavano partopren-cele vojaĝis la okcitana vilaĝo.

Krom oficialaĵoj estis enprograme ekspozicio pri e-libroj, prezentado de video-kurso "Mazi en Gondolando", "munĵetado", kaj prelego de R. Boré pri ZEOJ (Zamenhofaj E-Objektoj), Jak Le Puil, "Jomo kaj la Mamutoj", Tutpirinea E-Horo kaj ni mem konsistigis la muzikan parton de la programo.

Pro ekzisto de plaĉa lingva simbiozo ni havis la ŝancon rondumi jen esperante jen okcitane kaj ekkontakti najbarojn rigarde al venonta Kataluna Kongreso en Figueres kaj la UK en Montpellier. Se de tempo al tempo vi larme sentas vin kongres-orfa ni sincere konsilas ke vi ne maltrafu najbarojn.



### OMAĜE AL RENAT LLECH-WALTER

Nia veterana esperantisto kaj aktivulo de la kataluna movado de la Federacio Langvedoko-Rusiljono festis sian 90an naskiĝtagon. En la omaĝo al nia elstara amiko, okazinta

en la loka Kongrespalaco la 5an de majo, partoprenis katalunaj esperantistoj el Lleida, Manresa, Sabadell kaj Terrassa. (Informon pri tio nia Asocio aperigis en la revuoj Heroldo kaj Esperanto de UEA).

## KURSO-FINO EN VALLDEMOSA

Finiĝis la esperanto-kursoj en la elementa lernejo "Nicolau Calafat" en Valldemossa (Majorko). Du jarojn post ĝia komenco la du instruistinoj gvidintaj la kursojn enpostenigis en aliaj lernejoj, tiel ke la kurso ne povis restarti ĉi-septembre.

Ĝin iniciatis Unesko-projekto Fundapax (retadreso: e.r.a.@agora.stm.it). Dank'al la ĉi tiu projekto estis eldonitaj esperanto-lernolibro por lernejoj kaj gvidilo por instruistoj. S-ino Elizabeta Formaggio kunordigis, el Italio, diversajn lernejojn, kiuj aliĝis al la esperanto-kursoj (i.a. en Italio, Germanio, Uzbekio, Filipinoj kaj Afriko). Tiuj lernejoj mem kontaktis inter si, interalie per korespondado kaj rondirantaj rakontoj verkitaj de la lernantoj. La majorkaj infanoj ĉefe korespondis kun uzbekaj sametuloj kaj la sperto, pro la kultura diverseco inter la landoj kaj la nekonateco, montriĝis tre riĉiga.

### LIBRO-TAGO EN SABADELL

Pasintan 23an de aprilo, Centro de Esperanto Sabadell prezentis E-eldonaĵojn en la budo disponigita de la loka Ŝparkaso Sabadell en ties urbocentraj ĝardenoj. Oni disdonis multajn informfoliojn kaj varbis homojn por la Cseh-kurso kiun gvidis tie dum junio la internacia instruisto Aristóphio Alves Andrade.

## ESPERANTO EN LA SOMERA KATALUNA UNIVERSITATO

Dum la pasinta monato aŭgusto oni okazigis en la urbo Prada la 28an kursaron de UCE (Somera Kataluna Universitato). Prada troviĝas en la regiono Conflent, kiu etendiĝas en la norda parto de nia lando. Ĉi foje estis kurso pri Esperanto kaj por ĝin eklerni. Lecionoj okazis dum la dek tagoj de la kursaro kaj la intereso de la kursanoj estis rimarkebla kaj daŭra. Tiu kurso estis la unua en la tuto historio de la Universitato.

Antaŭ kelka tempo, la estraro de KEA klopodis konatiĝi kun la ĉefo de UCE por proponi kurson de Esperanto patronitan de KEA. Dum tiu klopodo serĉis sian vojon, D-ro M. Porter, rektoro de la Somera Kataluna Universitato, laŭ propra sendependa iniciato, petis D-inon Neus Moly instrui Esperanton dum la 1996a kursaro. Ŝi akceptis volonte kaj pro sia KEA aneco la deziro de la estraro plenumiĝis per vojo tute ne atendita.

La kurso estis preparita de Neus kaj de sia edzo kaj samideano



Ramon Parera. Kiel baza materialo oni prenis la BEKKURSON de la profesoro Dennis Keef, adaptita al la universitata karaktero de la kurso kaj al sia daŭro: dek lecionoj unuhoraj. La lecionojn partoprenis ĝis dek ses homoj, el kiuj dek estis konstantaj. Kelkaj el ili havis profesiajn laborojn rilatajn al lingvaj aferoj kaj aliaj studis lingvajn karierojn en tutjaraj universitatoj. Estis instruisto pri dancoj, kiu kutimas partopreni internaciajn renkontiĝojn de sia profesio, kaj

diris ke li ŝatus instrui internacie pere de Esperanto. Kelkaj kursanoj, kutimuloj de UCE, informis pri sia malnova intereso pri nia lingvo.

Kataluna Somera Universitato estas sufiĉe grava en nia socio kaj jen malgranda skizo pri sia historio kaj nuna situacio. En 1968, GCJC kaj GREC (Kultura Grupo de Kataluna Junularo kaj Rusiljona Grupo por Katalunaj Studoj), organizis "Diades de Cultura Catalana", sub influo de la konata Franca Majo. Jam en 1969, la afero fariĝis "Kataluna Somera Universitato" kaj komencis tradicion de rezisto al la frankisma tiraneco kaj de katalunema agado en franca Katalunio. Ĝis sia nuna sana stato, ĝi travivis riĉan evoluon kaj kelkajn krizojn. Ĉijare partoprenis la kursaron 1.310 studentoj, krom profesoroj, prelegantoj, ĵurnalistoj, artistoj kaj organizantoj. Partopreno estas malfermata por ĉiuj kiuj deziras agi universitate, sen alia antaŭkondiĉo.

Ramon Parera





FINFINA APERO

Post pli ol dek jaroj da (fi)aktivado tra la paĝoj de *Kata Luno*, Arnau Torras publikigis libroforme sukan kolekton de siaj monde famaj komiksoj. La amasiĝinta kvanto da malpruda materialo tiel superabundis, ke unu volumo ne sufiĉis. Des pli bone, ĉar kontraŭ malesperantisme ridinda prezo eblas kapti du albumojn, kiuj estas fakte denova antologio de la KEJ-revuo (almenaŭ la tria) el la plej abunde redunda kunlaboranto kaj elteninta redaktoro. Sed la mon-melko plene indas, ĉar la prezento pimpe impresas kaj legendas absolute la sukega enkonduko al la libro fare de la aŭtoro mem.

Nu, ekkuru al via plej proksima libroservo kaj mendu tuj. Vi ja vidos, eble mire, ke meze de tiu stako da piĉoj, mamoj, cicoj, ĉurovoj, kacoj kaj seks-skermado troviĝas superabunda fluo da inkoza literaturo kaj multe da ARnau TORras. Ĝuu la libron kaj danku la Zagrebajn esperantistojn, ke ili ĝin eldonis.

Sam Kugatano



malfacileco de la lernado kaj kultura malneŭtralo.

*La cultura del catalanisme* (Empúries, Biblioteca Universal 77, 1995) sendube fariĝos gvid-verko por ĉiuj venontaj esploristoj de la kataluna naciismo. Ĝi fakte bone dokumentas multajn faktojn konatajn inter la studemuloj sed prisilentataj de la oficialaj popularigantoj de historio. En la verko aperas abundaj referencoj al la esperanto-pioniro Frederic Pujulà i Vallès pro lia agitado kiel redaktoro de la semajngazeto *Joventut*, sed (sur paĝoj 143-144) esperantismo estas prezentita kiel tipa ekzemplo de la tiutempa ligiteco de katalunismo kun “ilustrado, laikeco, raciismo kaj bonfarado”.

Multege pli faka estas la verko *Sociolinguistic and Language Planning Organizations* (John Benjamins, 1995) fare de la katalunaj socilingvistoj Francesc Domínguez kaj Núria López. Temas pri volumo el serio de libroj listigantaj organizaĵojn rilatantajn al lingvoj. Ĉi tiu specife pritraktas socilingvistikajn kaj lingvoplanajn organizojn. La libro entenas ankaŭ diversajn esperantajn asociojn, verŝajne dank’ al la longa rilatoj inter KEA kaj Kataluna Instituto pri Socilingvistiko apartenanta al la Departamento pri Lingva Normaligo de la kataluna registaro. Detale aperas Kataluna Esperanto-Asocio kaj iu Esperantic Studies Foundation (prezidita de Humphrey Tonkin, dum pri UEA ekzistas nur ĝia adreso).

REFERENCOJ AL ESPERANTO

Diversaj nacilingvaj verkoj aperintaj en la lastaj monatoj interese parolas pri esperanto.

Miquel Siguan, konata esploristo kaj diskoniganto de la lingva situacio en Hispanio kaj famiĝinta pro sia elstara *España Plurinlingüe* (Alianza Universidad 701, 1992), aperigis ĉe Edicions 62 *L’Europa de les llengües* (Llibres a



l’Abast 285, 1995). La verko tre alireble pritraktas la lingvan situacion en Eŭropo kaj ĉefe en Eŭropa Unio. Ĝi bone prezentas i.a. la problemojn de elekto de internacia lingvo kaj studas la kazon de esperanto kaj de la angla. En la unua kazo li konstatas, ke ĝi ne sukcesis ĝis nun fariĝi vaste akceptita lingva perilo, dum en la dua li eksplikas la problemojn kreatajn de la alpreno de nacia lingvo, kiujn bonege regas esperantistoj:

## LANĈO DE KLASIKAĴO

Internacia Esperanto-Muzeo ĵus eldonis la poemaron *El miaj sonoraj soloj* de la granade andaluza poeto Miguel Fernández, asidua partoprenanto de niaj esperanto-kongresoj. Fernández sendube ne viciĝas nur inter la ĉefaj verkistoj esperantistaj de l' nuntempo, sed tiu verko, sekvanta lian partoprenon en la kvaropan volumon *Ibere libere*, evidentigas, ke ni troviĝas antaŭ unu el la ĉefpoetoj nialiteraturaj. Kaj tie la profunda enkonduko de kritikisto Antonio Valén, prologe de la libro, plene trafas: ni troviĝas ĉe samrangulo de Kalocsay, Tárkony, Maura, Auld, Boulton, de Kock, Ragnarsson, Nervi... kaj, mi aldonus, Montagut. La libro, kiel li prave asertas, "naskiĝis klasika", kaj la laŭŝtupaj "omaĝoj" fine de la libro atingas nivelon malfacile egaleblan de grandioza poezio, trahaŭte naskita el sensivo unika, sed distilita tra la plej fajnaj alambikoj de lertega tekniko metia. Jen nur juvelero, el poemo al la forpasinta patro:

Kaj mi divenas vin,  
bredisto de  
printempoj,  
ĉiama konviktito pri  
vitalo,  
parto de mia utopio,  
patro,  
tostanta kun la morto  
je la vivo.

Hektor Alos i Font



## DE SEABRA PUBLIKIGAS PLURLINGVE

La 7an de junio okazis en Mataró prezento de la kataluna romano *El dia que Jesús va traïr Judes* de la verkisto Manuel de Seabra. Hektor Alos parolis pri la aŭtoro kaj pri ĝia pli-ol-kvindek-jara ligo kun esperanto. Seabra, denaske portugalo, jam delonge loĝas en Katalunio, kun kies lingvo kaj kulturo ĝi konatiĝis kiel adoleskanto dank' al la *Kataluna Antologio*. Li laboris kiel ĵurnalisto en Lisbono, Londono kaj Barcelono, verkis tri poemarojn kaj 12 romanojn, tradukis ĉ. centon da verkoj el kaj al diversaj lingvoj kaj kunaŭtoras la grandan vortaron dudirektan Portugala-Katalunan. Liaj esperantaj poemoj kaj rakontoj aperis en diversaj revuoj kaj ankaŭ en la dua eldono de la *Esperanta Antologio*. Li redaktis *Antologion de portugaj rakontoj* (1959) kaj portugalis *Pri arto kaj morto* de Miyamoto Masao. Li aŭtoras gravan kaj detalan artikolon pri la esperanto-literaturo en enciklopedio Espasa-Calpe (suplemento 1975-1976).

Ĉio ĉi estis ĝis nun publika kaj konata, sed de antaŭ kelka tempo, Seabra diskonigis, ke granda parto de sia beletra produktado kiel aŭtoro estis malnete verkita originale en esperanto kaj nur poste tradukita portugalen, katalunen aŭ hispanen, laŭ la publikebloj. Ĝuste de Seabra nun pretigas sian kompletan verkaron en esperanto, kies unua volumo, *La armeoj de Paluzie*, antaŭe aperinta katalune, portugale kaj ruse, antaŭ ne longe eldoniĝis ĉe Internacia Esperanto-Muzeo (nepre legu pri la ĉi-romanaj avataroj kaj la interesaktan kolofonon aperanta en la esperanta versio). Informojn pri tiu ambicia projekto vi povis legi en la antaŭa numero de ĉi revuo, sed raportoj aperis jam dufoje ankaŭ en la kataluna revuo *El Temps*.

## 28a Kataluna Kongreso kaj 1a Transpirinea Esperanto Kongreso en Figueres

Se la kongreso en Mataró jam sufiĉe novstilis, la venontjara kongreso eble ŝtupos plien danke al sia kunorganizada trajtaro. Efektive, nia asocio kaj la federacioj en Langvedoko Rousiljono kaj Provenco provos antaŭenpuŝi ĉi komunan aferon. Tio ebligas esperi ne nur pri riĉigo de la kongresenhavo kaj pliigo de partoprenontoj sed ankaŭ pri dezirinda normaligo kaj plioftigo de niaj kontaktoj kun transpirineaj federacioj.

Alia esperiga flanko de la preparaj kongres-taskoj estas la montrita engaĝiĝo de la sufiĉe ĵusbakita loka grupo kiu, interalie, «kulpas» pri elekto de kongresdatoj. Tiu ĉi elekto bonaŭgure samdatigas nian kongreson kaj lokajn festojn de Sta. Creu en Figueres, kio, certege, plibuntigos

la kongrestagan etoson. Krome, kontaktoj kun urbodomaj respondeculoj estis momente ne nur trankviligaj sed eĉ esperozaj: kaze ke ekfaritaj kontaktoj definitiviĝu ni povos kongresumi en ĉarma kaj epokstila Casino Menestral kaj niaj kongresaj vesperoj verŝajne kontribuos la urban oficialan festprogramon.

En nia skiza itinero ni ne forgesu pri la kongrestemo «Neregistaraj organizaĵoj kaj internaciaj rilatoj»; nia asocio havis ĉi jaron eblecon sufiĉe sukcese eniri NRGOn solidarecan vivon danke al projekto pri Bosnio. Pri tiu ĉi okazaĵo kaj pri graviĝado de tiu ĉi socia fenomeno oni antaŭvidas prelegojn, ekspoziciojn, debatojn jen katalunlingvajn jen e-lingvajn.

Momente akceptis nian inviton Daniel Durand, sekretario de Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ Malsato kaj de Internacia Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo kaj Daniele Vitale, sekretario de IKEL. Plej verŝajne ni havos la ŝancon rokumi plurlingvece danke al koncerto de «Jomo kaj la Mamutoj» kaj eĉ ni strebas al okcitana folk-vespero kaj al homturoj. Vi kalkulu ankaŭ pri omaĝo al pinta figuerano Delfi Dalmau kaj pri la literatura festo. Literaturemuloj povas jam certi pri la kompromisa partopren-akcepto de Manuel de Seabra kaj de Vimala Devi.

Sed tamen ni ne sternu la tuton kaj atendu venontaĵojn por precizigi informojn.

«Karl Polanyi iam skribis en artikolo ke ekzistas tri manieroj ensociiĝi: pere de la merkata interŝanĝo, pere de la aŭtoritateco de la ekonomia plano kaj pere de la interamika kaj interparenca reciproka sindonacemo. Tiel, la donaceco, la solidareco evidente malhavas monavidan intereson: nur profunda morala impulso sencigas ĝin. Neniel influas ĝin interŝanĝemo aŭ ia truda ordonpovo. Leĝo rajtas trudi liberecon aŭ egalecon sed ne povas devige instigi al frateco. Nur pere de volonteco, solidareco akiras sian ekzisto-sencon.

En la ĉiam pli progrese raciigita nuna mondo-situacio oni emas opinii ke ĉio solveblo se oni efike kombinos ŝtaton kaj merkaton. Sed troa merkateco estas danĝera: ni eniras en profundan ĝangalon kie fortulo venkegas, kie malfortulo (junuloj, virinoj,

maljunuloj, handikapitoj, analfabetoj) malvenkegas. Troa ŝtateco same danĝeras: formigas potencan kaj memflatan ŝtatan burĝaron kiu facile koruptemas. Ĉiukaze, tamen, la ŝtato estas pli laborokupiga (eduko, sanig-servoj, urbanismo...) ol la merkato. Ĉe la tiel nomata merkato-ekonomio la grandaj investoj celas produktad-aŭtomatigon kaj malkreskigon de laborokupiteco.


Sed ekzistas io kio estas nek merkato nek ŝtato. Temas pri la teritorio de la solidareco kie diskreskas, disvolviĝas la neregistaraj organizaĵoj tiel nomataj NRG. Oni statistikis ke pli ol 25% de la loĝantaro en plej riĉaj landoj apartenas al unu el tiaj organizaĵoj.

Fonto: «El Periódico».

Artikolo aperinta en ĉi gazeto la tagon 4a de junio de 1996.

Aŭtoro: Francesc Roca, profesoro en Universitato de Barcelono.

# 28. KATALUNA KONGRESO KAI 1. TRANSPIRINEA E - KONGRESO



# FIGUERES

1- 4 MAJO 1997